



Normanda Esperanto-Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL. TRIMONATA BULTENO.

Nº 8

--- JUNIO 1969 ---

XX

Redaktas: S-ino J. VINCENT. Rue des Oiseaux -27-LES ANDELYS

Sendu la manuskriptojn antaŭ la 10-a de februaro, 10-a de majo,
10-a de aŭgusto kaj 10-a de novembro.

ENHAVO:

- Paĝoj: 1 & 2: Iom da informado
2: Rezultoj de la nacia konkurso
3: La unua franca-germana Esperanto-kongreso
Por la infanoj
4: Vivo de la grupoj
5: Kotiztabelo

+++++

IOM DA INFORMADO.

Vi ĵus lernis Esperanton kaj prave fieras pro via nova scio. Ĉar vi opinias, ke tiu scio povas esti utila ankaŭ al aliaj, vi decidis labori por ĝin disvastigi: brave! Sed, se vi restos sola, vi ne povos fari multon. Vi devas nepre grupiĝi, unue kun viaj kunlernantoj, se vi lernis en publika kurso: la loka grupo estas la unua ŝtupo de la Esperanto-movado. Se vi lernis per koresponda kurso, tiam vi agos utile se vi grimpos sur la duan ŝtupon, t.e. la regiona asocio aŭ federacio, kiu estas kolekto de la lokaj grupoj kaj izoluloj loĝantaj sur ĝia teritorio. Per tiu dua ŝtupo, kaj sen pliaj klopodoj, vi jam povos utile kunlabori sur la nacia kaj internacia kampoj, ĉar la federacio estas parto de la landa asocio, kiu estas mem parto de la universala asocio: tio estis fakte via celo, ĉar vi certe ne lernis Esperanton por babilo kun via najbaro, sed por havi kontaktojn kun la tuta mondo.

Necesas kompreni, ke la tasko de la federacio estas ne nur kunligi la esperantistojn de la regiono (i.a. por renkontiĝoj, kongresoj), sed ankaŭ organizi interhelpoj inter la diversaj lokaj soci-

etoj kaj grupoj kaj instigi kreadon de novaj grupoj (per ekspozicioj, korespondkursoj). Sed evidentas, ke federacio estas paralizita en sia deziro agadi, se ne ĉiuj pretas kunhelpi almenaŭ per aliĝo.

D-ro ALBAULT André

prezidanto de Unuiĝo Franca por Esperanto (U.F.E)

prezidanto de la sudfrancpirenea Federacio por Esperanto.

— • — • — • —

PRAKTIKAJ INFORMOJ.

Kion fari por atingi tiun duan ŝtupon? Se ekzistas grupo en via loko, ĝia prezidanto donos al vi ĉiujn informojn.

Se vi estas izolita, sendu vian kotizon al

Fédération Normande des Centres Culturels "Esperanto" p.ê.k. Rouen
2348 06 Z

Por 6 F. vi ricevos la membrokarton UFE-UEA kaj 3 Esperanto-Aktualités". Por 30 F. vi krome ricevos la Revue Française d' Esperanto.

XXXXXXXXXXXXXXX

REZULTOJ DE LA NACIA KONKURSO.

Partoprenis ĝin nur sep personoj. Sendube, la aliaj, kiuj aliĝis, trovis la enigmojn tro malfacilaj. Ĉar neniu el la konkursintoj veturos al Helsinki, la du unuaj premioj ne estas aljuĝitaj.

Jen do la rezulto:

3-a premio: 1 albumo Thiaude kun 375 neuzitaj francaj ^poŝtmarkoj
(valoro 60 F): S-ro L. GILOTEAUX 3, allée Béranger 59-CROIX

4-a ĝis 7-a premio: 10 F da libroj mendeblaj ĉe U.F.E.

S-ino G.RIGAL Les Vendanges Av. de la République 27-Les Andelys

F-ino J. RIGAL sama adreso

F-ino V. PANNIER 13, rue Sadi Carnot 27-LES ANDELYS

F-ino S. BONNET 6, Bd Néhou 27-LES ANDELYS

+++++

VIVO DE LA GRUPOJ.

LE HAVRE. La 26-a^a de aprilo, je la 18-a horo, S-ro Pottier el Yvetot vizitis la grupon en la salono François Ier.

LES ANDELYS. Dum la Paskaj ferioj, la sekretariino de la Zamenhofa Kulturcentro, Silvia Bonnet, vojaĝis al Dublin, kie ŝi partoprenis la britan kongreson, dank' al stipendio de la grupo. Ŝi estis la sola Francino. La prezidantino, S-ino Vincent, partoprenis la unuan francan-germanan kongreson en Strasbourg.

29-an de majo kaj 7-an de junio: Atesto pri Supera Lernado.

14-an de junio, 20.30: en la nova urba junularcentro, apud la C.E.S

S-ro Senet, el Sotteville, prezentos Sicilian vesperon. Bonvenon!

29-an de junio: 3 junulinuoj forveturos al Grésillon kun S-ino Vincent
(daŭrigo sur p. 4)

LA UNUA FRANCA-GERMANA ESPERANTO-KONGRESO.

Je Pasko okazis en Strasbourg nia nacia Esperanto-kongreso kune kun la germana en la fakultato pri beletro kaj humanaj sciencoj de la Strasburga universitato, en tute nova kvartalo. Partoprenis entute 380 homoj el 8 nacioj. Ĉio plene sukcesis, ĉar esperantistoj sentas sin fratoj.

La ĉefa temo estis: Kiel sukcesigi la instruadon de Esperanto en la lernejoj? La oratoroj francaj kaj germanaj samopinias pri tiu necesa ago: la junuloj lernu Esperanton!

Aliflanke la kongresanoj ĝuis sunan veteron kaj varmon. Strasbourg estas beleaga ĉefurbo. Okazis promenado per ŝipo. De ĉie oni admiras la belan katedralon. Plie, okazis meso tute en Esperanto, dank' al S-to Wannemakers el Nederlando. Ni ĝuis komunan bankedon en Kehl (Germanujo). Dimanĉon vespere, la esperantistoj ĝuis spektaklon pri folkloraj dancoj, kaj poste okazis balo por la samideanoj.

Lundon posttagmeze, la busoj veturigis nin tra Alzaco, kie ĉie kreskas vito, kaj ni vizitis la kastelon Haut-Koenigsbourg. Mardon, la tutan tagon, la kongresanoj veturis en Germanujo tra la Nigra Arbaro ĝis Baden-Baden kaj Oberkirch. Ju pli supreniris la busoj, des pli sin montris restanta neĝo brilanta sub la varma suno.

Kaj, ĉar ĉio bona havas finon, ni reveturis al Strasbourg por la lasta fojo. Sed, nun, ĉiuj ĉeestintoj germanaj kaj francaj povas memori pri tiu rava kongreso.

La venontan jaron okazos en Monaco franca-itala kongreso je Pentekosto, la 17-an de majo. Partoprenu ĝin!

S-ino LAVALLEE Helena, el Le Havre.

=====

POR LA INFANOJ (daŭrigo)

SENILUZIIGO.

Francisko ne plu iros paŝti kun Mario. Li estas malbona; li ĝojas lin inciti. Li volas mordigi lin per Fidèle.

- Kss!... Kss!... Mordu lin!..

Aŭ li diras:

- Ho! mi vidas tie viron, kiu venas... Ha! Kompatinda Francisko, estas la gardisto! Li tuj venos protokoli!..

Se ŝafino flankeniras:

- Rapiĉu, Francisko, venigu ŝin!..

Kaj se Francisko ne iras:

- Mi volas apartigi miajn ŝafojn de la viaj! Reprenu la viajn, iru paŝti sola, kien vi volos!..

Tial, ĉivespere, Francisko diris al sia patrino:

- Panjo, mi ne plu volas iri kun Mario: li turmentas min.

- Certel respondis la patrino; vi nun estas granda; vi ja povas malhavi lin!

(daŭrigota)

VIVO DE LA GRUPOJ (daŭrigo)

LISIEUX. Okazas ĉiusemajna kurso (8 progresantoj, 1 komencantino). Kvar unuagradaĵ gelernantoj sukcesis en Atesto pri Lernado: F-ino Gallot, S-ino Quillet, S-roj Brisard kaj Tailpied. Ĉi lasta partoprenis la Paskan restadon en Grésillon.

ROUEN-SOTTEVILLE. La 18-an de aprilo okazis la monata kunveno, kun raportoj pri la diversaj paskaj kongresoj:

regiona jarkunveno de U.F.E. en Evreux (S-ro Jouis)

unua franca-germana kongreso en Strasbourg (G-roj Loisel)

24-a S.A.T-amikara kongreso en Paris (S-ro Lemarchand). Per sonbendoj, oni aŭdis salutojn el Britujo, Nederlando, Svedujo, Germanujo, Indonezio, registritajn dum la kongreso.

Oni akceptis S-ron Kleinclauss el Nancy, nun laĝantan en Rouen.

Rezultoj de la ekspozicio de la 23-a de marto: post tri bonaj artikoloj kun foto en la regiona gazeto, alvenis demandoj pri la koresponda kurso, kiun jam partoprenas kvin personoj; du el ili ĉeestis la lastan kunvenon.

S-ro Senet prezentis lumbildojn pri Sicilio. La venonta kunveno okazis la 9-an de majo en la malnova lernejo Renan, rue Marion.

XXX

MIA UNUA VOJAGO AL " ESPERANTUJO".

Dum la lastaj paskaj ferioj, mi konatiĝis kun la Esperanto kulturdomo Grésillon.

Mi ĉeestis la kursperiodon de la 6-a ĝis la 12-a de aprilo.
 Kun ia maltrankvilo, mi forveturas al tiu loko. Mi demandas min ĉu mi
 komprenos la aliajn staĝanojn, kaj en kiu etoso mi vivos tiun semajnon.

Ce mia alveno, la vido de la kastelo trankviligis min: bel-aspekta, situanta en fama regiono, meze de agrabla arbarkovrita parko, mi tuj pensis trovi tie la idealan lokon por ripozi kaj perfektigi miajn kelkajn Esperantajn konojn. Kiel ne trovi plezuron en tia loko!

La unua persono, kiun mi vidis ĉe la lasta vojkurbiĝo antaŭ la kastelo estas Skoto kun sia kilto: imagu mian surprizon! Tiu unua kontakto sufiĉis por konvinki iun ajn pri la internacieco de la Esperanta lingvo!

Pro la kongresoj en Paris kaj Strasbourg, la staĝanoj ne estis tiel multnombraj kiel kutime. La organizantoj bedaŭris tion. Sed, por mi, tiu eta nombro ebligis pli bone interkonatiĝi kaj rapide formi amikan grupon.

Piede aŭ veturilo, ni agrable promenadis en la ĉirkaŭaĵoj (vizitadoj al kasteloj, muzeoj). Dank' al bela vetero, ni plene profitis la famekonatan klimaton de tiu regiono. Post la vespermangoj, ni kunvenis en la komforta salono kaj babilis aŭ ludis, aŭ projekciis lumbildojn kaj filmojn. Unu el tiuj vesperoj estis animata de la juna grupo en Bauge. Tiuj paroladoj kelkfoje daŭras tre malfrue. Tiam, la tempodormo estis mallonga. Feliĉe, en la matena kaj printempa fraŝeco, la kukolkanto ĉiutage vekis nin kaj diris al ni, kiom la nova tago ankoraŭ estos riĉa je amikeco.

Certe mi ne forgesos mian unuan restadon en Grésillon. Mi esperas iam retrovi ĝian fratecan atmosferon kaj plilarĝigi la rondon de miaj esperantistaj amikoj.

S-ro TAILPIED, el Touques (Calvados)

KOTIZTABELO.

Union des Espérantistes de Normandie.		2 F
p.ĉ.k. Rouen 283-40 E		
U.F.E. {	sen "Revue Française".	6 F
	kun "Revue Française".	30 F
U.E.A. {	kun Jarlibro).	17,50 F
	kun "Esperanto" kaj Jarlibro)	35 F
Fédération Normande des Centres Culturels "Esperanto"		
p.ĉ.k. Rouen 2348-06 Z		

LASTHORE:

VIRE/. Jus instaligis, kiel staciestro, nia amiko S-ro Colleu kiu loĝis en Evreux antaŭ kelkaj jaroj. Koran bonvenon!

Dépôt légal: 3ème trimestre 1969. La gérante: Mme J. Vincent.

Polycopié par le Centre Culturel et
d' Amitié Internationale Zamenhof 27-Les Andelys.